

Junio 2016

Oomoto Internacia

(Oomoto International / Jinrui Aizenkai)



No.6 / 01.06.2016

Enkonduko pri Oomoto

Pri Dio Uŝitora

Ankaŭ dum tiu periodo li kaŝe gardadis la mondon por eviti ĝian pereon. De ĉi tio devenas la nomo Dio Uŝitora.

Sed dum ĉi tiu Dio toleris la ermitan vivon, la surtera mondo ruiniĝis tiel ke ĝin regis “egoismo” kaj “perfortismo”. Pensante ke ne nur homaro sed ankaŭ ĉiuj vivaĵoj pereos, se li lasos la mondon en la nuna stato, li ree aperis en 1892, pere de la korpo de Fondintino DEGUĈI Nao, kiel la reganto de la surtera Dia mondo. Jen la fondiĝo de Oomoto.

Pri la Spirito de Mizu

La Spirito de Mizu estas tiu, kiu posedis Majstron DEGUĈI Onisaburo.

“La Spirito de Mizu” signifas en Oomoto-terminaro la mondsavan Dion, aŭ funkcion de Dio.

Ni priskribu iom pli detale. Ĉe la kreo de la granda universo, la origina Dio, ununura kaj absoluta, transiris el la neaktiva stato de absoluta unueco al aktiva kaj krea. Tiam Li necese manifestiĝis en du-polusaj funkcioj, egalaj je plus (anodo) kaj minus (katodo).

Ĉi tiujn du-polusajn funkciojn ni nomas “la Spirito de Izu” kaj “la Spirito de Mizu”. Do “la Spirito de Mizu”, kiu troviĝas en ĉi tiu libro, estas unu el ili.

Introduction about Oomoto

About the God Ushitora

During this period he secretly guarded the world to prevent its destruction. Hence the name, God Ushitora.

While this God tolerated his seclusion, however, the earthly world was ravaged under the rule of selfishness and violence. Considering that not only the human race but also all living things would perish if he were to leave the world in its present state. He reappeared in 1892, through the body of the Foundress DEGUCHI Nao, as the ruler of the earthly Divine world. Thus Oomoto was founded.

About the Spirit of Mizu

The Spirit of Mizu is that which possessed the Co-founder DEGUCHI Onisaburo.


In the terminology of Oomoto “the Spirit of Mizu” means the Saviour God or Divine function.

Let us discuss this in somewhat more detail. When the greater universe was created, the original God, one and only and absolute, passed from the inactive state of absolute unity to an active and creative state. He then necessarily manifested Himself in the functions of opposite poles, plus (positive) and minus (negative).

These bipolar functions we call “the Spirit of Izu” and “the Spirit of Mizu”. The Spirit of Mizu which is referred to in this book is, therefore, one of these.

Copyright (C) 2015 Jinrui Aizenkai-ULBA (Universal Love and Brotherhood Association)
All Rights Reserved.

Ten'on-kyo, Kameoka, Kyoto, Japan 621-8686
<http://www.jinruiaizenkai.jp/> <http://www.oomoto.or.jp/>



Junio 2016

Oomoto Internacia

(Oomoto International / Jinrui Aizenkai)



No.6 / 01.06.2016

Diaj Revelacioj

En la 26-a jaro de Meĵi (1893)

En la mondo ekzistas nur unu suno. Kun sep aŭ ok reĝoj, la mondo senĉese havos konfliktojn. Sekve, Mi aranĝis la planon regi la mondon per unu Dia reĝo.

Nu, ĉiuj homoj en la mondo, ŝanĝu vian koron. Mi revenigos la mondon en la originan pratempon.

Nu, baldaŭ malfermiĝos surprizskatolo .

Ĉar venis la tempo de Dia mondo, tiun, kiu havas fortan dikredon, Mi utiligos por la sankta laboro.

Ĝis nun Japanio kaj aliaj landoj apartiĝis unu de alia, sed, manifestiĝante, Mi unuigos ilin kaj realigos Dian mondon, daŭran por ĉiam.

Mi, Dio Uŝitora, manifestiĝos kiel jamao de la materia mondo.

La diversaj aferoj, grandaj kaj fenomenaj, kiuj okazas en la mondo — ĉiuj estas pontoj, kiujn Dio Uŝitora transiru. Pro tio, pripensu pri la mondaj okazaĵoj kaj tiel vi povos iom post iom kompreni Dian planon kaj fari veran korŝanĝon.

Ĉar Mi utiligas veran homon kiel ilon, en la mondo iom post iom evidentiĝos Dia rimedo.

Okazos vek-afero bona. Kaj okazos ankaŭ vek-afero malbona. Korektu do vian koron, rigardante la okazaĵojn en la mondo. Nove Mi ŝanĝos la mondon.

Kiam Mi komplete manifestiĝos sur la tero, Mi faros la mondon tute pura kaj favoros pli frue tiun, kiu ŝanĝos sian koron. Kiam realiĝis la kristale pura mondo sub Dia regado, ĉio iros laŭ homa deziro. Elserĉante animojn, konformajn al Dia koro, Mi utiligos ilin por la sankta laboro. Juĝante la animojn , Mi alŝnuros. Se Mi alŝnuris, Mi neniam lasos

Divine Revelation


1893

As the sun shines, but one in the sky, so shall the world be ruled as one according to the Divine Plan. The people of the world must repent and get prepared! I will restore the world to the former Divine Kingdom, which shall last forever through the manifestation of Divine Power. Then, Ushitora no Konjin shall make His appearance as the judge of the world. You shall see, as it were, the lid of a Jack-in-the-box open. In the Kingdom of Heaven those who are sincerely religious shall be of service.

If things wonderful and extraordinary should happen in the world, remember that these are but stepping-stones over which the Divine Plan is to be carried by Me, Ushitora no Konjin, for the Reconstruction of the World. World happenings, when taken into consideration, will throw light upon the Divine Plan and enable you to repent, indeed. I speak by the mouth of the faithful on the earth, so gradually My grace will be made known. There shall be good eye openers, and evil ones; so amend your conduct in view of world events.

When this Kami manifests Himself gloriously, the World shall be changed into a crystal-clear one, so the sooner penitent and converted, the better shall anyone be.

When the World is turned into a crystal-clear one, everything will go well here on earth. Then those who have crystal-clear souls, after investigation, shall be in His service. Because Kami will, upon examination, create a bond which unites Him and those souls which , one knit, will not break; those souls will be directly endowed with a portion of His Spirit.



Junio 2016

Oomoto Internacia

(Oomoto International / Jinrui Aizenkai)



No.6 / 01.06.2016

Diaj Vojsignoj

Ĉapitro 1

41. Kiu ne reale praktikas Diajn instruojn, nur dirante “Ja bonege, ja dankinde!”, tiu faras pekon en sia koro. La dikredo sen praktikado eĉ naskas timon kontraŭ Dio.

42. Kiu bedaŭras ke la vivteno fariĝis pli malfacila de kiam li komencis dikredon, tiu fariĝas pekulo kontraŭ Dio. Ĉi tiu ja malprave plendas al Dio: dum ankoraŭ pli kaj pli granda damaĝo estis okazonta al li, Dio savis lin ŝanĝante grandan malfacilaĵon en la malgrandan. Kvankam nescianta, li estas puninda en Dia rigardo.

43. Kiu tuj plendas al Dio, kiam okazas malfeliĉo al lia familio, tiu estas vera malbonulo.

44. En tia okazo, ĉiu rezolute sin apogu al Dio, tiom pli purigante la animon. Dia koro estas plenplena je deziro savi ĉiujn homojn en la mondo, ĉar el ili ĉiu estas ido de Dio.

45. Elektu la ŝipon de l' Dia instruo. Evitu la ŝipon de homa kaĵolo kaj ne ripetu krimojn spitante Dion.

46. Daŭrigu dikredon ĉiam kun la koro senŝanĝa kiel ĉiam verda pinarbo, kaj vi estos animsavita.

47. Troviĝas neniuj, kiu ne petas al Dio, kiam furiozas tondro aŭ tertremo. Daŭrigu dikredon ĉiam kun tia koro.

48. La konstanta dikredo akumuliĝas kaj fariĝas la savŝipo por krizo.

49. Ekzercu spite al alta aĝo, ĉar senlima estas Dia vojo. Alproksimiĝu al Dia regno, paŝante laŭeble rapide.

Diaj Vojsignoj estas sankta libro, verkita de Majstro DEGUĈI Onisaburo, Kunfondinto de Oomoto (1871-1948). Plenigita de la Dikaraktero de la Spirito de Mizu, li skribis en 1904, kiam li estis 33-jara, en Ajabe, en la gubernio Kioto, Japanio.

Divine Signposts

Chapter 1

41. The person who only says ‘how wonderful, how blessed am I!’ without practising God’s teachings is committing a sin in his heart. Faith without practice even gives rise to fear of God.

42. The person who regrets the fact that his life has become more difficult since he began to believe becomes a sinner against God. Wrongly does he complain to God: while yet greater harm was to come to him, God saved him, turning great difficulties into small ones. Although ignorant of this, he is worthy of punishment in God’s eyes.

43. The person who immediately complains to God when misfortune comes to his family is a true wrongdoer.

44. In such an event, may all resolutely lean on God, purifying their souls all the more. The heart of God is full of the desire to save all people in the world, for every one of them is a child of God.

45. Choose the ship of the Divine teaching. Avoid the ship of human coaxing and do not repeat sins in defiance of God.


46. Hold always to your faith with a heart unchanging like the evergreen pine, and your soul will be saved.

47. There is no one who does not appeal to God when storms or earthquakes rage. Hold to your faith always with this spirit.

48. Constant faith accumulates and becomes a ship of salvation at times of crisis.

49. Practise in spite of old age, for boundless is the Divine way. Approach the Divine realm with as fast a step as possible.


Divine Signposts is a sacred text written by Onisaburo DEGUĈI, the Co-Founder of Oomoto (1871-1948). Imbued with the divinity of the Spirit of Mizu, he wrote it in 1904, at the age of 33 years, in Ayabe, Kyoto Prefecture, Japan.



Esplorado de Vivĝojo

1. Deziro esti feliĉa

Faru



“Esplorado de
Vivĝojo”
Hidemaru Deguchi

Spite malfacilecon faru! Marŝu nur antaŭen!

Faru bruon iel ajn!

Pensu kaj pensu! Diru kaj diru! Faru kaj faru!

La negativo estas infero.

La pozitivo estas paradizo.

La kosmo turniĝadas sen halti eĉ unu momenton.

Faru ion ajn, kion vi ekvolas.

Faru per la tuta korpo, per la tuta koro!

Mobilizu ĉiujn ĉelojn de via korpo!

Streĉu ĉiujn sangangiojn de la tuta korpo!

Ion faru, ne gravas se ĝi aspektas banala.

Ne gravas, eĉ se ĝi ŝajnas nur infanludo.

Nur faru kun plena intereso.

Nur faru – jen vera vivo.

Ne gravas teorio. Ne gravas kiel ajn aliaj pensas.

Nur faru tion, kion vi volas, tion, kion vi decidis fari.

Faru unu post alia, kio aperas antaŭ vi.

Nur faru kaj faru!

Fari ja estas vivi!

Koncentradu ĉiujn fortojn al la nuna tasko, forgesante ĉion alian!

“Esplorado de Vivĝojo” estas libro verkita de la Tria Kungvidanto DEGUĈI Hidemaru (1897-1991). Ĝin ni kompilis el “Memornotoj de mia kredado” de li el 8 volumoj, kiuj konsistas el la frazoj elĉerpitaj el liaj taglibroj de liaj studentaj tagoj.

In search of Meaning

1. The heart in search of happiness

Act

Compel yourself to act, forge ahead;

Make a noise of anything, of everything;

Keep thinking, go on talking, exert yourself.

Hell is being passive,

Heaven is being on the move.

The universe never pauses in its gyration.

Whatever comes to mind,

Give yourself to it body and soul.

Stir up every particle of the flame of life

And set the blood to racing.

No matter how paltry,

Even if it seems like child's play,

It is part of real life

If it yields interest, joy, and satisfaction.

Reason is all the same,

Don't waste time with theory---

Those things you want to do,

The jobs you have decided to take on,

Whatever is right at hand,

Get on with it;


And one task after the other,

Hasten to fulfill.

Act. Accomplish. For that is your life.

Without undue pause for thought, we must throw ourselves body and soul into the work of the moment.

“In Search of Meaning” is a book written by Hidemaru Deguchi (1897-1991). This book is the excerpt from the diary Hidemaru kept writing when he was a university student. It was a little compiled from the original text in order to focus on the general readers.



Junio 2016

Oomoto Internacia

(Oomoto International / Jinrui Aizenkai)



No.6 / 01.06.2016

Jinrui Aizenkai

La Unua Internacia Konferenco, IRUH - "la Internacia Reto de Universala Homama Asocio"

Jinrui Aizenkai

The First International Conference
IRUH - "The International Network of
Universal Love and Brotherhood Association"




La 19an de majo, 2016, en la Universitato Ĉulalonkon en Bankoko, Tajlando, La Unua Internacia Konferenco de "Universala Homama Asocio" okazis kun 200 partoprenantoj el 25 landoj. Okaze de la Festo en Ajabe por la 90-a datreveno de la fondiĝo de UHA, pasintjare, 2015, D-ro Phichai Tovivich emfazis la gravecon de la Internacia Reto de UHA. Reponde al lia sugesto la 3-an de aprilo, 2016, la Internacia Reto estis starigita en Kameoka, kaj ĝi kondukis nin al la Unua Internacia Konferenco. UHA estis establita en 1925 de Onisaburo Deguchi kaj post 10 jaroj multaj ĉefsidejoj kaj branĉoj jam estis malfermitaj en Eŭropo, Nord-Ameriko kaj Sud-Ameriko. Ankaŭ en Siamo (Tajlando) la ĉefsidejo estis fondita de s-ro Kijozumi

On May 19th 2016 at the Chulalongkorn University, in Bangkok Thailand, The First International Conference on " Universal Love and Brotherhood " was held with 200 participants from 25 countries .

At the Occasion of Ayabe Inaugural Celebration of the 90th year of the foundation of ULBA last year, 2015, Dr Phichai Tovivich emphasized the importance of the International Network of ULBA. Following its suggestion on April 3rd 2016 the International Network was set up in the city of Kameoka and its establishment led to the First International Conference.

ULBA was established in 1925 by Onisaburo Deguchi and within 10 years many of the headquarters and branches were opened in Europe, North America



Junio 2016

Oomoto Internacia

(Oomoto International / Jinrui Aizenkai)



No.6 / 01.06.2016

Ĵinrui Aizenkai

Takehi, la unua estro de ĝi.

Vere estis neatendita koincido, ke la kunveno de la Unua Internacia Konferenco en Bankoko estis aranĝita ĝuste en tiu universitato, kie antaŭ 81 jaroj la ĉefsidejo de UHA estis fondita - sub la gvida principo de Onisaburo Deguchi.

La fondinto de Samnak Poo Sawan, Respektinda Ariyawangso Bhikkhu, bonkore ĉeestis la unuan azian Konferenco de UHA en la Internacia Halo de Kioto, 1981. Tiam li sincere esprimis kun profunda kompato establi Braĉon de UHA en Tajlando, tamen bedaŭrinde pro diversaj kialoj tio ne realiĝis. Sed tio estis plenumita de D-ro Phichai Tovivich. La branĉo havas la nomon "Taj- Centro de UHA", kies prezidanto estas D-o Krasae Chanawongse.

Estis vere granda evento. La 19an de la lasta majo, ni vidis la emblemon de UHA sur la dekstra flanko de la fono de la scenejo, kaj tiun de Oomoto sur la maldekstra flanko, en Chulalongkorn Universitato. La ceremonio komenciĝis per la nacia himno de Tajlando, kaj homoj paradis kun la bildo de la Reĝo de la Tajlando, kiun kondukis dekdu flagoj de ĉiu religio (Budhismo, Islamo, Sikhismo, Ĝajnismo, Ŝinto, Konfuceismo, Bahaismo, Taoismo, Judismo, Zoroastrismo, Hinduismo kaj Kristanismo). La 12 personoj sekvis la flagojn de Oomoto kaj de UHA kaj la flagon de UHA de Tajlando. La Homoj portanta ĉiun flagon kolektis sur la scenejo.

Poste video - titolita " Starigo de Universala Homama Asoio " estis montrita, kaj sekve ĉiuj


Jinrui Aizenkai

and South America. Also in Siam (Thailand) - headquarters was created by Mr. Kiyozumi Kakehi as the first chief of the headquarters.

It was really by a curious coincidence that the venue of the First International Conference in Bangkok was arranged in the same University, where 81 years ago, the headquarters of ULBA - under the guiding principle of Onisaburo Deguchi was created.

The founder of Samnak Poo Sawan, Venerable Ariyawangso Bhikkhu kindly attended the first Asian Conference of ULBA in Kyoto's International Hall in 1981. He sincerely expressed with deep compassion in establishing the Thai Branch of ULBA, unfortunately due to various reasons it was not realized, however it was taken by Dr Phichai Tovivich in which it finally materialized under the name of the "Thai Centre of ULBA" with Dr Krasae Chanawongse as the president. It was really a great event.

On May 19th at the backdrop of the stage of Chulalongkorn University we could see on the right side the Universal emblem of ULBA and on the left side the emblem of Oomoto. The ceremony started with the national anthem of Thailand and a parade with a picture of the King of the Thailand leading the twelve flag holders from each religion. (Buddhism, Islam, Sikhism, Jainism, Shinto, Confucianism, Bahaism, Taoism, Judaism, Zoroastrianism, Hinduism, and Christianity). The 12 people preceded by the flag of Oomoto, the flag of ULBA and the flag of ULBA Thailand. The People carrying all the flags gathered on the stage.



Junio 2016

Oomoto Internacia

(Oomoto International / Jinrui Aizenkai)



No.6 / 01.06.2016

Ĵinrui Aizenkai

partoprenantoj silente preĝis por la viktimoj de ambaŭ tertremoj en Kumamoto de Japanio kaj en Ekvatoro.

D-ro Tovivich deklaris la malfermon de la Konferenco. Bonveniga mesaĝo de D-ro Krasae Chanawongse, la prezidanto de UHA en Tajlando estis prezentita, kaj poste Tokihiko Asada, la prezidanto de Ĝenerala Ĉefcentro de UHA en Japanio, legi la mesaĝon de Kurenai Deguchi, la Spirita Gvidantino de Oomoto.

La paroladoj de Tokihiko Asada kaj Glen T. Martin estis prezentitaj. Ankaŭ, Kardinalo Thuong Tam Thanh, la Prezidanto de Sacerdota Konsilio de Kaodaismo en Tay Ninh, Vjetnamio, faris paroladon kaj montris la videon "Oomoto vizitis Tay Nihn en 2015, pasintjare".

Oni prezentis raportojn pri agadoj en branĉoj de diversaj landoj krom Japanio. Saluton faris D-ro T.P. Amarasinghe, Srilanko markoton ULBA, Ojesh Bajracharya, Aizen Centro de UHA en Swoyambhu, Nepalo. Pramad Gimil venis de Honkongo. Madan Bahadur Pradhan ankaŭ venis al Tajlando de Nepalo.

Post ĉiu parolado D-ro Thakur Phanit, la vicprezidanto de UHA en Tajlando prezentis la Bankokan deklaron kaj la partoprenantoj unuanime akceptis ĝin kaj fine Yasuhiko Inagaki faris la ferman saluton.

Ĉe la fermo, D-ro Phichai Tovivich proponis, ke en novembro 2017, ni kolektu denove por la dua internacia konferenco ĉe la sama kunvejo sub la idealo de UHA, kaj ke pli da organizoj kaj individuoj partopren ĝin.

Jinrui Aizenkai


After that a video - titled "Establishment of Universal Brotherhood" was shown followed by a silent prayer for the victims of both earthquakes in Kumamoto prefecture in Japan and Ecuador by all the participants.

Dr Tovivich declared the opening of the First International Conference. Welcoming message by Dr Krasae Chanawongse, the president of ULBA Thailand was presented then Tokihiko Asada, president of ULBA General Headquarters in Japan read a message from Kurenai Deguchi, the Spiritual Leader of Oomoto.

Keynote speeches by Tokihiko Asada and Glen T. Martin were presented. Then Cardinal Thuong Tam Thanh, Chairman of the Cao Dai Sacerdotal Council of Tay Ninh in Vietnam made a speech and showed the video of Oomoto visiting Tay Nihn 2015 last year.

As part of reports from activities in various oversea branches, Dr T.P. Amarasinghe, Sri Lanka Branch of ULBA, Ojesh Bajracharya, Nepal Swoyambhu Aizen Center of ULBA made greetings. Pramad Gimil came over from Hong Kong. Madan Bahadur Pradhan also came to Thailand from Nepal. After all speeches Dr Thakur Phanit, vice president of ULBA Thailand presented the Bangkok declaration and unanimously accepted and finally Yasuhiko Inagaki made a final greeting.

At the closing, Dr Phichai Tovivich proposed that in November 2017, we should gather again for the second international conference at the same venue under the ideology of ULBA, and requesting more organizations and individuals to participate.



Junio 2016

Oomoto Internacia

(Oomoto International / Jinrui Aizenkai)




No.6 / 01.06.2016

NOVAĴO

En Seula Internacia Monda Stadiono, la 1an de majo, 2016, okazis la Centjara datreveno de Ŭonbulismo, kiun festis 50.000 partoprenantoj.

En la nomo de Oomoto kaj UHA, Tokihiko Asada, la estro de Oomoto kaj UHA kun Kacuja Kimura, la Ĝenerala Sekretario de UHA - partoprenis en tiu memorinda okazaĵo.

Rev. Asada havis la interpalaron kun la Respektinda Hahn En Sook, la prezidanto de Ŭonbulismo, kaj li trabsdonis al ŝi la gratulmesaĝo de Kurenai Deguĉi, la spirita gvidantino de Oomoto.



NEWS

At the Seoul International World Cup Stadium, May 1 2016 - the Centennial celebration of Won

Buddhism was commemorated with 50,000 participants.

From Oomoto and ULBA, Tokihiko Asada, Chief of Oomoto and ULBA with Katsuya Kimura, General Secretary of ULBA - taking part in this auspicious occasion.

Rev. Asada had an exceptional conversation with Venerable Hahn En Sook president of Won Buddhism and gave her the congratulatory message of Kurenai Deguchi, spiritual leader of Oomoto.

Sam Nak Poo Sawan havis la 50an Datrevenon

La 20an de majo, 2016, en Centra Bankoko, kie situas la organiza oficejo de Sam Nak Sawan. Tiu okazigis la 50an datrevenon kun ĉirkaŭ 300 partoprenantoj, inkluzive de 22 membroj de UHA kaj Oomoto.

En tiu ceremonio komuna preĝo estis oferita de D-ro Phichai Tovivich. Kaj Rev. Tokihiko Asada legis gratulan mesaĝon de Kurenai Deguchi, la Spirita gvidantino de Oomoto kaj UHA.



Sam Nak Poo Sawan 50th Anniversary

May 20th 2016, Central Bangkok - located at the organizational office, 50th anniversary of Sam Nak Sawan was celebrated with about 300 people in attendance, including 22 members from ULBA and Oomoto. During this ceremony a extended prayer was offered

by Dr. Phichai Tovivich and Rev. Tokihiko Asada read a congratulations message by Kurenai Deguchi, Spiritual leader of Oomoto and ULBA